

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA „DRUŠTVO HRVATSKIH ESPERANTISTA“
KAJ DE LA „KROATA AKADEMIA ESPERANTISTA SOCIETO“.

MONATA

GAZETO.



La „Kroata Esperantisto“
aperas la 20^{an} de ĉiu monato.

Abono:

1 jaro (12 numeroj) K 4.—
» (6 numeroj) K 2.—
Por unuiganoj jara abono K 2.—

Redakcio kaj Administracio:
Zagreb, (Kroatujo) Zrinjski trg 16.
Redaktorino: **Danica de Bedeković.**

Reklamo:

1 paĝo K 25 1/4 paĝo K 7
1/2 » » 13 1/8 » » 4
kun unufoja apero.
Por 7—12 anoncoj 25% rabato.
Po linioj laŭ interkonsento.

ENHAVO: St. Tomić: Pri reformoj — G: Voĉo el Dalmatujo. — Tria brita esp. kongreso. — Prvi esperanto-dan za sve zemlje Austro-ugarske monarhije u Beču. — Elleder: Ne timu. — Heine-Hinrichsen: Asra. — Ignotus-Rajczi: La tago de la gloro. — Greinz-Rosenstock: La diamantoj. — Krajcer: Rakonto pri la violeto. — Vukasović-Čupić: Fabloj. — Humorajoj. — Societaj sciigoj. — Hejma movado. — Diversaj sciigoj.

Naŝe uredništvo preselilo se na Zrinjski trg br. 16.

La adreso de nia redakcio estas nun „Zrinjski trg“ No 16.

Molimo naŝe duŝnike, da ŝto prije udovolje svojoj duŝnosti!

MALGRANDA ANONCARO.

(Ĉiufoja presigo de tia anonco kostas 60 helerojn = 25 sd.).

K. Kuthan, red de »Studento«, (organo por int. korespondado de studentoj) petas informojn pri studado en Kroatujo. Praha II. Ječna ul. 24.

Sro **Marko I. Koprivica**, komercisto, Ĉemerno, Avtovac, Hercegovino, desiras korespondadi per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj kun geesperantistoj el ĉiuj landoj.

Sro **Stanislav Rosenstock**, Zagreb, Gundulićeva ul. 35. serĉas »Kroatan Esperantiston«, No 2a, jarkolekto 1909. Oni sendu proponojn.

Sro **Đuro Vojković**, apotekisto, Klanjec, Zagorje, Kroatujo, deziras korespondandi per leteroj aŭ ilustritaj poŝtkartoj kun geesperantistoj el ĉiuj landoj, pretepe el Bosnujo, sia patrujo

INTERŜANĜE RICEVITAJ GAZETOJ.

(Esperantske novine, koje dobivamo u zamjenu).

Jara abonkosto, Sm.

Jara abonkosto Sm.

Algérie-Transports Saint-Eugène (Alger) 8, rue Carnot. Redaktoro: Maurice Aubert	2-80	La Ondo de Esperanto , Moskvo, Tver- skaja 28, Red. A. A. Laĥarov	1-00
Bohema Esperantisto (Ĉesky esperan- tista) of org. de »Bohema Asocio Es- perantista«. Praha III. Kampa 495, Bohemujo Red. H. K. Bouška		La Pioniro , Budapest, VI, Nagymező-u 12. 1/16 Red. Jules de Bulyovszky	1-
Brazila Esperantisto , of. org. de la »Braz'la Ligo Esperantista«, Rio de Janeiro, Rua S. José N. 77.	2-40	La Revuo , Paris, 79, Boulevard Saint Germain, Red. Carlo Bourlet	2-41
Časopis Českých Esperantistů , mon- nata organo de l' Bohemoj. Praha II. Ditricheova 7. Red. Ed. Kühn	1-50	La Spritulo , gazeto por humoro, Leip- zig, Körnerstr. 31, Red. Richard Bresch	1-20
Dana Esperantisto , Kopenhago. Frede- riksborgg, 26 Red. F. Skeel-Gjorling	0-65	La Suno Hispana , Valencia, Pintor Lopez 3 Red. Augusto Jimenez Loira	1-20
Esperanta Abelo , Bologna (Italujo) M. d'Azeglio 600, A. Tellini	0-50	Le Monde Espérantiste , Paris, 3, Rue Sophie-Germain. Red. L. Carlos	0-85
Esperanto Nouvelle , Paris, une d'Alesia.		Liber Penso , Sens (Yonne), Francujo Sekr. R. Derhays	
Espero Katolika , Paris, 10. Rue Bé- ranger. Dir. Abato Austin Richardson, ĉefredaktoro: Claudius Colas	2-	Lingvo Internacia , Paris 33, rue Lacépède, Red. Th. Cart	2-
Eurpa Kristana Celado , Genevo, 4. Cité. Red. Ch. Briquet	0-75	Lorena Stelo , Nancy, 63 Rue de Villers, Red. Docteur Noel	0-40
Fides , Vilassar de Mar, Carres de Sant Roc, 22.	1-20	Lumo , org. de l' »Bulgara Esperantista Ligo«, Popovo, Bulgarujo.	
German Esperantisto , of. org. de la »Germana Esperantista Societo« Berlin, Lindenstr. 18/2. Red. I. Borel	1-50	Mitteilungen , of. org. de la »Esperanto Gesellschaft« Dresden, A. Bismarckpl. 12	1-
Gr. Klingva Esperantano , Samos (Aria-Turklando), Red. »Samosa Espe- rantista Societo«	1-20	Norda Gazeto , Saint-Omer, Boul. Vauban Red. E. Deligny	0-40
Hina-esperanta Revuo .		Normanda Stelo , Rouen 41, Rue de la Vicomté, Red. Liébard et Lerouc	1-
Hungara Esperantisto , Budapest, Alpár- u. 8. Red. Josefo Miletz	1-70	Norvega Esperanta Gazeto	
Informaj Raportoj , Wien, VII/I. Band- gasse 31, Red. K. V. Ahlgrimm	1-	Norvega Esperantisto , Kristiana Stol- makergate 6. IV.	
Internacia Pedagogia Revuo , Bystřice Hostyn, Moravio. Red. Th. Čejka	1-	Notizie Esperantiste , of. org. de la »Grupo Esperantista« Palermo, Via S. Agostino, N. 6. Red. Giov. Casigliola.	
Internacia Socia Revuo , Red. J. L. Brujin, Kepplerstraat 170, Hago, Neder- lando		Nova Sento , Bilbao (Hispanujo) Strato Jardines, 7	0-90
Japana Esperantisto , Tokio Marunouchi. Red. Ĉif Tošio	1-	Paris Esperanto , of. org. de »Groupe Espérantiste de Paris« Red. 3, Place Jussien, Paris V.	2-
Junco , of. org. de la »Franca federacio de la Juna Esperantistoj. Paris, 152. Boulevard Raspail, Dir. F. Duviard.		Oficiala Gazeto Esperantista , Paris 51, rue de Clichy	2-
La Australia Verda Stelo , George Collingridge, Barnsby N. S. W. Australia.		Pola Esperantisto , Varsovio, Marszał- kowska 143. Red. Dro. Leono Zamenhof	2-
L'Informilo , alais (Francujo), 8, Rue de Rome		Portugala Revuo , Porto, Rua do Rosario 215, Red. S. A. Proenca	2-
La Duonmonato , Eld. Johan Heyn, Tho- masring 6, Leipzig. Red. Karl Steier.		Rumana Esperantisto , Bukarest, 5. Str. I. C. Brătianu, Red. Dro. G. Robin	2-
Le Du teloj , org. de »Chila Esperan- tista Asocio, Casilla 728. — Santiago. Chile.		Rumana Gazeto Esperantista , of. org. de l'Federacio de la Esperantistaj So- cietaj el Rumanujo, Bukaresto, Str. Colței 16. Dir. Dro. S. Kimel.	
La Esperanta Instruisto , London, W. 17. St. Stephen's Square. Red. I. C. O'Connor	0-75	Ruslanda Esperantisto , Peterburgo, Nevskij, 40 Red. Dro. Espero	3-20
La Esperantisto , Leipzig, Talstr. 27. Red. Fritz Stephan	1-35	Samdeonmonato , Redak. Verda stello & Ko. 33, Abekawa-machi Asa- kusa, Tokio Japanujo	
La Espero , C. C. Briggs, Publisher Acorn Place, des Moines, Iowa, U. S. A.		Sarta Stelo , Le Mans Sarthe (Franc- ujo), 14, rue Scarron, Red. Lepeltier	0-40
La Hollanda Pioniro , of. org. de la hollanda societo »La-Estondo Estas Nia« Kepplerstr. 170, Hago. (Red. H. Block, Singel, 386 Amsterdam).		Studento , revuo de studentoj esperan- tistoj. Praha Red. K. Kuthan, Ječná 24. Adm. F. Stepanek, Karsin 241.	
La Londona Gazeto , of. org. de la »Federacio de la Londonaj Grupoj Es- perantistoj« London, 78 Malvern Road. Red. C. P. Isaac	0-50	The British Esperantist , High Holborn, London, W. C.	1-5
		Tra la Finstelo , Béziers, Francujo 2, rue Abelard, Red. Firo Flourans	0-80
		Tutmonda Espero , Barcelona, Paradís 12	2-
		Verda Stelo Internacia , Miller, Mi- surio, U. S. A.	
		Universo , Dresden 20 Red. Dro. Albert Schramm	
		Voko de Kuracistoj , Lwów (Aŭstrio- Galicio), Strato Śniadeckich Nro. 6. Red. Dro. Stefan Mikolajski	1-50

KROATA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA „DRUŠTVO HRVATSKIH ESPERANTISTA“
KAJ DE LA „KROATA AKADEMIA ESPERANTISTA SOCIETO“.

MONATA

GAZETO.



La „Kroata Esperantisto“
aperas la 20^{an} de ĉiu monato.

Abono:

1 jaro (12 numeroj) K 4.—
(6 numeroj) K 2.—
por unuiganoj jara abono K 2.—

Redakcio kaj Administracio:
Zagreb, (Kroatujo) Zrinjski trg 16.

Redaktorino: **Danica de Bedeković.**

Reklamo:

1 paĝo K 25 1/4 paĝo K 7
1/2 » » 13 1/8 » » 4
kun unufoja apero.
Por 7—12 anoncoj 25% rabato.
Po linioj laŭ interkonsento.

ENHAVO: St. Tomić: Pri reformoj — G: Voĉo el Dalmatujo. — Tria brita
esp. kongreso. — Prvi esperanto-dan za sve zemlje Austro-ugarske
monarhije u Beču. — Ellender: Ne timu. — Heine-Hinrichsen:
Asra. — Ignotus-Rajczi: La tago de la gloro. — Greinz-Ro-
senstock: La diamantoj. — Krajcer: Rakonto pri la violeto. —
Vukasović-Čupić: Fabeloj. — Humoraĵoj. — Societaj sciigoj. —
Hejma movado. — Diversaj sciigoj.

PRI REFORMOJ.*)

La homara historio montras al ni, ke la apero de ĉiu religio, de ĉiu socia
religia sistemo, post kelktempa ekzistado estis sekvata de apero de deslan-
gaj teorioj, konsiderataj kiel herezo de la ortodoksaj disciploj. Ne nur ab-
raktaj idearoj estas fruktabundaj je herezoj, sed eĉ ĉiu konkreta teknika eltro-
taĵo naskas multnombrajn sistemojn kaj patentojn, kiuj ne ĉiam montras efektivajn
plibonigojn kaj pliperfektigojn, sed ofte nur reformemon kaj aliĝemon pro ambi-
cio aŭ profitespero.

Estas kompreneble, se Esperanto ne povis saviĝi de tiu ĝenerala sorto de
ĉiaj kreitaĵoj, ke inter ĝiaj apobantoj nepre devis ankaŭ naskiĝi ekdeziro refor-
madi, pliperfektigadi. Kvankam tiu fenomeno ne mirigas nin kaj, ĉe la unua dis-
tinkto de Esperanto ne timigas nin, estas tamen bone serioze prijuĝi ĝin: por
ĉio verema, nenia fenomeno estas sensignifa.

La elementoj de lingvo, kiuj povas bezoni plibonigon, estas: gramatiko,
fonologio, fonetiko kaj ortografio. Sintakson mi ne citas, ĉar ĝi ne povas esti
regulata por reguloj: ĝin kreas la stilaĵ modelaroj.

La gramatiko de lingvo povas esti reformata nur en du direktoj: plisim-
pligante kaj eligante konfuzigaĵojn; la kreo de novaj vortoj kaj afiksoj estas afero
de literatura disvolvigo, ne de arbitra regularo. Plisimpligi esperantan gramatikon
estus deziro, se ne absurda, almenaŭ malserioza. Kiom oni povas plisimpligi gra-
matikon konsistantan el 16 reguloj sen esceptoj?!

Reguloj naskantaj konfuzigon, en Esperanto tute malestas. Oni nur tralegu
„araono“ tradukitan de Dro K. Bein, kaj oni diru ĉu lingvo, kapabla reesprimi
ĉiajn delikatajn nuancojn de homa penso en tia ĉefverko, kun klareco kaj perfek-
teco egalaj al tiuj de l' originalo, povas enhavi konfuzigaĵojn.

*) Upozorujemo naŝe cijenjone ĉitatelje na ovaj izvrsni ĉlanak naŝega vrloga zemljaka, prvoga
profesora Esperanta, koji nam ĉlanak jasno pokazuje, kako je besmisleno nastojanje, reformirati
izvrsni i laki Esperanto.

Uredništvo.

Ĝis nun, kiom mi scias, la etimologiaj kaj fonetikaj reformdeziroj naskiĝis nur inter eŭroplingvanoj. Kial? Ĉu Esperanto ne estas esence Eŭropa lingvo? Ĝi ne pli rajte la Azianoj povus postuli reformojn konformajn al iliaj idiomoj? Ĝi estas parto de homaro, kvante pli konsiderinda ol Eŭropanoj. Sed ili silentas pri reformoj; eĉ niaj japanaj samideanoj energie protestas kontraŭ ĉia ektaŭso de la Fundamento. Ĉu la francaj Idistoj, kiuj volas tute francigi lingvon internacian, rimarkas, ke tio estas internacia malĝentilaĝo. La Eŭropanoj ne pensu, ke ili havas la iajn privilegiojn, rilate al internacia lingvo: Zamenhof ne estas Eŭropano: per lia kreitaĵo mem li fariĝis homarano, kaj Esperanto apartenas al Afriko samgrade kiom al Rusujo, kie ĝi estis naskita.

Sed kia lingvo ĝi fariĝus, se ĉiu nacio ekvolus enŝovi en ĝin siajn elementojn! Ĝi ja reprezentus ion pli teruran ol la konfuza bruo, ĉirkaŭinta la legendan Babilonan turon.

Esperanto konsistas superrege el romanaj vortradikoj, kion ja pravigas la historio de nia civilizacio, daŭriganta nur la civilizacion antikveklasikan. Fonetike ĝi estas belsona, poezia lingvo, kaj se iuj sonoj ne plaĉas al ĉiu naciiano, la naciianoj memoru, ke ankaŭ la sonoj de ilia patra lingvo ne povas plaĉi al ĉiu aliĉiano. Ĉiu homo lerninta kelkajn lingvojn scias, ke komence oni malfacile venas la senton pri strangeco, eĉ malbonsoneco de la novaj sonkombinigoj. Do ni ne estu pli netoleremaj rilate al Esperanto, kiu devas interkomprenigi homojn plej diversligvana konsento, ol ni estas rilate al lingvo de nia najbaro.

Graza Idisto, volante montri la malbelsonecon de Esperanto, kunflikis frazon kun multaj sinveksantaj: »ĉiuj tiuj kiuj . . .«. Ĝi estas la samo, kiel se oni provu la malperfektecon de franca lingvo per la frazo: »car Didon dina dit-on-dos d' un dodu dindon«. Tio ja estas malhonesteco aŭ ligva nescio. Mi supozas, ke la lastan okazon eĉ la aludita Graza Idisto, kaj petas lin, ke li bonvolu la lingvon antaŭ ol aŭtoritate verkadi pri ĝi.

Ĉu mi parolu pri la simpleco de ortografio? Mi timas ridindigi min, provante pruvi evidentajn. Tamen estas homoj, kiuj trovis en Esperanta ortografio forĵetindajn aĵojn. Tiel iu Graza Idisto harangis kontraŭ la kompatindaj supersignoj, dirante ke estante karakterizaj por slava ortografio, ili estas forĵetindaj de la germana Belegan ideon pri internacieco konceptis tiu ĉi sinjoro. Mi gratulas!

Ĝis nun mi penis montri nur la senutilecon de reformoj arbitraj, nun mi diros kelkajn vortojn pri ilia maljusteco kaj malutileco.

Maljustaj ili estas ĉar ili aperas en periodo propaganda. La nunaj Esperantistoj estas nur oneto de la estonta Esperantistaro, kaj ili arogas al si la rajton altrudi reformojn al tiuj estontaj Esperantistoj. Ĉu ili estas certaj, ke se ilia reformpropono estus akceptitaj ne povus veni tempo, en kiu, konvinkite pri la superflueco kaj malĝusteco, la Esperantistoj ne reforĵetus ilin, revenante al la bona Fundamento? Ĉiu honesta samideano laboru por la disvastiĝo de nia lingvo kaj rezervu siajn gustetojn por tempo pli oportuna. Kaj la honestaj konkurantoj ne nomu ilian lingvoprojekton »reformita Esperanto«, ĉar tio tre similas al ruzo de la fabrikanto-fuŝisto, donanta al sia fuŝaĵo nomon de alia bona komencaĵo, por tropeallogi aĉetantojn.

Malutilaj estas la reformoj arbitraj, ĉar ĝi plifortigas nian plej gravan malamikon: la dubon al nia sukceso. Kiu estus tiel freneza lerni internacian lingvon se li scius, ke ĉiu 5 aŭ 10 jare oni enkondukos reformojn tiajn, ke la tuta antaŭlaboro prilingva kaj literatura fariĝu subite senvalora.

Feliĉe la reformoj fantome vagadas en la cerboj de reformemuloj multajn amase, ol en realeco.

Esperanto disvastiĝas senĉese, kaj ĝiaj sinceraj anoj kondukas ĝin al fina punkto ne deklinigite de la diversaj gustodiferencoj. Mi konkludas per la devizo de la estiminda kunfrato »Lingvo Internacia«: ni fosu nian sulkon!

Stanislav Tom

DO EL DALMATUJO.

Ĉu ne? La plimulto de nia estimata legantaro opinias, ke Dalmatujo ankoraŭ
akradis la belajn sonojn de nia lingvo?

La celo de tiuj ĉi linioj estas montri, ke ankaŭ tiu ĉi mizera lando konatigis
la verda steleto kaj ĝia signifo.

En majo 1908 oni legas artikolojn pri esperanto en »Sloboda«, »Velebit«
esperantaj en Split), »Crvena Hrvatska« kaj »Dubrovnik« (aper. en Dubrovnik);
ĉi tiu parolado, kurso kaj eĉ fondiĝis klubo en Dubrovnik; aliaj urboj kaj urbetoj
ĉi tiu interesigi je tiu ĉi novaĵo.

Sed la pioniroj de nia afero, du studentoj, forvojaĝis al siaj universitatoj kaj
ĉi tiu la fervoreco kaj entuziasmo ekdormis por dormi ankoraŭ hodiaŭ.

Sed feliĉe la komenco de la Esperanta movado lasis en Dubrovnik signon,
ĉi tiu tre karan — unu nomon, kaj tiu ĉi estas: »Admirinda« (tiel nomas la du-
bvnikina kinematografo)

En la 1909. Dalmatujo estas inde reprezentita per bravaj siaj filoj: S Ferri
la V-a. kongreso kaj N Mirošević de Sorgo eĉ la I-a. bohema kongreso en
ĉi tiu. R. Rubčić paroladis pri ĝi en la »Stiria Esp. Societo« en Graz.

Sro kand. forest. Karl de Radimiri paroladis la 16an de tiu ĉi monato en
akademia Societo Esperantista« en Wien pri »Esperanto en la suda parto de
monarĥio«.

Ni estu kontentaj pri la ĝisnunaj sukcesoj, esperu pri tempoj pli feliĉaj, kaj
ĉi tiu pacience »ĝis la bela sonĝo de l' homaro por eterna ben' efektiviĝos«.

Glorlupo.

LA BRITA ESPERANTISTA KONGRESO. BEĈI BRITANSKI ESPERANTSKI KONGRES, 1910

Od predsjudnika esperantkoga društva u Cheltenhamu, gospodina Arch-
ald Kenyon stiglo je našemu uredništvu veoma ljubezno pismo, u kojem se
sivlju Hrvati esperantisti, da posjete treći britanski kongres esperantista, koji će
obdržavati u Cheltenhamu 14. 15. i 16. svibnja 1910. — Naš je tajnik gosp.
evan Vidak primio prekrasni »afišo« od toga društva, koji je izvjesio
našim društvenim prostorijama. Cheltenham je sa svoga prekrasnoga položaja,
torijske znamenitosti i kao središte triju velikih kolegija najzgodnije mjesto za
av kongres u ĉitavoj Velikoj Britaniji. I okolica Cheltenhama poznata je sa
je ljepote. Gradska kuća, koju je gradsko vijeće ustupilo kongresu, imade naj-
gantnije i najkusnije dvorane za sastanke u ĉitavoj Engleskoj. Putnici na
ngres dobit će veliki rabat na željeznicama. Želi li tko posjetiti taj kongres,
a se obrati na slijedeću adresu: *Archibald Kenyon* (loka organizanto de la
a Brita Esp. Kongreso) *Oscarville, Hayward's Road, Cheltenham, Glos,*
glujo.

VI ESPERANTO - DAN ZA SVE ZEMLJE AUSTRO-UGARSKE MO- RHIJE U BEĈU.

Esperanto - Tago en Wien. Pentekosto 1910. Laŭ la propono de la
go de germanlingvaj aŭstriaĵ Grupoj esperantistaj« okazos dum Pentekosto (15an
16an de Majo) la »Unua Tutaŭstria Internacia Esperanto-
go.«

Ĉiuj naciaj organizoj konsentis kaj promesis partopreni tiu ĉi gravan kunvenon.
La programo estas dissendota al ĉiuj esperantaj kluboj en plej proksima tempo.
Ĉiuj gesamideanoj estas korege invitataj veni Wien'on por partopreni.

Adreso: »Labora Komitato por la Esperanto-Tago«, Wien, I. Stubenring 18.
fejo Esperanto.

Literatura kaj amuziga parto de »Kroata Esperantisto«

NE TIMU.

Se vento furioza, fajfanta kaj akra
Marondojn bruigas kaj skuas kruuele,
Ĉipeton vagantan dezerto en akva,
Se fleksas malsupren malfortan ĝi velon —

Ĉu tiam do plendos en horo danĝera
Maristo sentima? Ĉu senesperigos
Kapricoj de l' mar' lin, perfida, mistera?
Ĉu povas li pensi ke lin pereigos

Ĥaos' d' elementoj? Ĉu povas timigi
Nin ĉiuj ŝtonpintoj de l'homa malsprito
Kaŝataj en mar' de nescio kaj igi
Nin dubi rektecon de voj' elektita?

Ne timu vi maron, malican, ŝanĝeman,
Sed naĝu kuraĝe antaŭen fiera —
Laboru sindone, fervora, penema,
Kaj vin rekompencos la venko de vero.

Por »Kroata Esperantisto« verkita de R. J. Elleder.

Vladivostok 20. I. 1910. (Orienta Siberio).

LA TAGO DE LA GLORO.

De Ignotus tradukis: *Rudolfo Rajczi*.

Mi kune sidis kun juna pentristo.

— Gloro . . . gloro . . . kredu vi ke la gloro ankaŭ, kiel la feliĉo, estas afero de la nervoj. Ekzistas homo, kiu neniam povas esti feliĉa kaj la suno de la gloro por li estas nordlumo, en kiu li frostremas, kvazaŭ elpelita hundo. Ĉu ni ne trinkus tason da grogo?

— Mi konsentas.

— Kelnero, ankoraŭ du grogojn! Ĉu vi aŭdas, kiel tremadas mia makzelo? Mi frostremas, kiel pasero, kaj sekve de tio mi mortos. Nur tio min konsolas, ke nun eĉ en Venetio pluvas.

— Nu, ni iru pli suden, en Napolon, en Sicilion.

— Lasu nur, mi tremus ankaŭ tie. Mi ĉiam frostremas. Matene, kiam mia kapdoloro min vekas, sub la plumkovriloj mi frostremante kunkurbigas. Post la baniĝo apud la varmega ferforno, dum mia haŭto preskaŭ bruliĝas, enkliniĝas miaj genuoj, tiel min tremigas la malvarmo. Mi frostremas ĉiam kaj ĉie.

— Estis vespero post la malfermo de la vintra ekspozicio, same kiel nun, noktomezo. Mi ne scias, kie vi vagadis, sole mi devis tie ĉi sidi en tiu ĉi malbenita kafejo. Mi legis ĵurnalon. Ĉiuj estis plenaj je la pentraĵa ekspozicio.

— Kaj je via gloro.

— Kaj je mia gloro. Ho! estis tre agrable! Vi ĉiuj, kiuj skribas tiujn nigrajn literojn por la presado, kaj ne ŝatas la interesecon de la famo, ĉar, kiel sukeraĵisto, vi scias, kiel ĝi pretiĝas, — vi nek scias, kian gravajon vi faras.

— Per unu vorto: ĉu estis agrable?

— Estis agrable, nature agrable. La nigraj literoj dancis antaŭ miaj okuloj, kaj jen serpentume, subkline, jen rerektege ĉiuj ili sibladis: mi estas la famo, la famo de cia nomo! Ĉiuj laŭdis mian pentraĵon kaj atendis de mi multon. Mi tion ne deziris de ili.

— Kion?

— Ke ili multon atendu. Mi estas konata de ili, eble de ili ĉiuj. Ili ĉiuj estas bravaj, ĝentilaj, kleraj sinjoroj. Kelkaj el ili estas ankaŭ geniuloj, troviĝas eĉ inter ili, kiuj ne estas kolorblindaj kaj scias, kio estas valoro, kaj arango. Mi tre ĝojis, ke ili min laŭdis, sed tion lastan mi ne deziris de ili.

La daŭrigo de „La Morto de Smail-aga Ĉengijiĉ“ sekvos en la venonta numero de K. E.

— Vi estas maldankema.
 — Ne, mi nur ne volas, ke vi min opiniu malsaga kaj ke vi kredu, ke mi
 la plej kredema publiko de mia gloro. Mi ne kredas en tiu gloro, kaj neniu
 la rajton ion atendi de mi.
 — Kial do vi pentras?
 — Sekve de malforteco, ĉar mi ne havas volon. Por ia honesta civila ofico
 ne havas la paciencon akiri la diplomon kaj oni devas vivi. Min pereigas
 gentileco de la homoj Kiam mi post la maturekzameno, ĉi tien venis, mi
 gis ĉe advokato kiel skribisto. Mi estis tre feliĉa, ke mi ne devis pensadi,
 ke mi respondis por nenio. Kun vera entuziamo mi skribis ducentfoje po tago:
 ngara generala konsuma unuigo kiel societo . . . « Post kvar tagoj venas mia ĉefo
 la vortoj: kara amiko, vi estas multe delikatcerba por ke vi suferu pro tiu
 alajra laboro. Vi naskigis por pli nobla kaj granda. Vi hodiaŭ posttagmeze
 por aukcii. Mi foriris, sed ne por aukcii. Mi estis, tre malsata kaj mi frost-
 nis terure . . . Mi dungigis ĉe malgrava ĵurnalo kiel tradukisto. Estis vera pa-
 iza vivo. Kun vera volupto mi tradukis de mateno ĝis vespero, de vespero ĝis
 eno: . . . kiel oni, el kompetenta fonto, nin sciigas . . . « Post kvar tagoj
 rolas min mia redaktoro: kara amiko, vi estas multe pli granda talento, por
 vi tiaspecaĵojn faraĉu. Vi naskigis por pli granda: hodiaŭ vi iros por inter-
 bligi la Maharagon. Mi foriris, sed ne al la Maharago. Mi estis malsata kaj
 ire mi frostremis. Ekrememoris mi mian malmultan pentristan scion. Mi iris
 ildpentristo kiel helpanto. Vi eĉ ideon ne havas, kiel ĝue mi desegnis per
 elo kaj linealo la literojn, kaj de mateno ĝis vespero mi feliĉa kolorigis ilian
 rajon per brila, bela, densa, nigra kolorilo. La kvaran tagon venas mia majstro:
 ra amiko, mi trarigardis viajn akvarelojn kaj desegnaĵojn. Vi ja estas granda
 nto! Ne estas inde por vi tia tagsalajra laboro. Vi naskigis por io pli nobla
 alta. Vi posttagmeze komencos tiun verdan leonon, kiun la najbara spicisto
 dis ĉe mi

(Daŭrigota).

RA.
 age el la fonto, kies akvoj murmuretas,
 belega sultanino je l' vespero promenadis,
 age ĉe la fonto, kies akvoj murmuretas,
 a junan sklavon vidis.
 kaj pli li paligadis
 vesperon al li iris
 princino, kaj ŝi diris:
 rup. Danujo.

»Tuj vi diru vian nomon,
 Vian hejmon, vian genton!«
 Diris do la sklav':
 »La nomo: »Mahomed!
 La hejmo: Yemen!
 Kaj la gento: tiuj Asroj,
 Kiuj mortas, kiam amas«.

H. Heine (trad. G. Hinrichsen).

DIAMANTOJ.

olf Greinz. Tradukis Stanislav Rosenstock.

Ili ambaŭ ankaŭ revis pri brila estonto. La estonto alvenis, la brilo tamen
 aperis. Dum sia tuta vivo ili migradis tra dezerta kaj malgaja nebula lando,
 la varmega sopiro en la koro pri la ora sunbrilo.
 Nemezureblajn ondojn da lumo ili deziris en siaj junaj tagoj. Poste fariĝis
 ĉi bezono pri la suno de l' feliĉo ĉiam malpli granda, ĉiam pli modesta. Ju
 pli junaj ili fariĝis, des pli ili estus kontentigitaj eĉ pri la plej malgranda
 o sur siaj grizaj vojoj.
 Kaj kiam ili fariĝis tute maljunaj, ili ĉesis entute esperi pri ia lumeto, kiu
 gus ilian ekziston. Ili kutimigis migradi ĉiam en la krepusko . . . sen suno,
 espero, sen feliĉo.
 Kiel juna muzikisto edzigis Franco Eberhard kun sia Doroteo. Ŝi estis malriĉa
 lino kaj li posedis nenion krom brilaj estontaj kasteloj, songoj pri gloro kaj sukceso.

La feliĉo neniam favoris la junan paron. Malsano kaj ĉagreno estis gas
ĉe ili. Unika infano mortis en tre juna aĝo.

La infano estis malgranda antaŭsento pri la leviĝonta sunlumo. Sed ĉe ti
ĉi feliĉon malheligis la eterna zorgo pri la ĉiutaga pano, ĝis fine la morto kov
per siaj pezaj nubamasoj la lastan peceton de l' blua ĉielo.

La juna muzikisto devis pene per lecionoj laborenspezadi por sia vivsubte
Kion ajn nur li entreprenis, ĝi malprosperis. Ŝajnis, kvazaŭ ia malbeno pend
super ĉio, kion li komencis. Aŭ eble tio tamen ne estis la bona kiso de l' muz
kiun li sur sie frunto kredis senti?

La granda armeo de l' nerekonitaj geniuloj gajnis baldaŭ en Franco Ebe
hard novan membron. Ju malpli juna li fariĝadis, des pli malfacile li trovadis la
borenspezon. La konkurenco de l' junaj fortoj estis tro sentebla.

Fine li devis siajn lecionojn de violonludo doni por vere almoza honorari
Kaj la fino — la fino estis plej maldolea.

Multajn jarojn li revis, kiel fama viro, kiel mondgloro virtuozo reveni
sian hejman urbon kaj prui al tieaj filistoj, ke oni lin jam de komenco maljuste
nerekonis. Post migrema vivado li revenis kiel maljuna, kaduka viro kun sia
zino, kiu ĉiujn malfeliĉojn fidele kun li travivis, por trovi en sia hejmo la lastan
prizorgon

Li ricevis malgrandan okupon ĉe la preĝeja ĥoro, propradire nur specon de
malriĉula prebendo. La manoj de l' maljuna violonisto fariĝis trememaj kaj la ĥo
restro jam multfoje konfesis al li malice, ke li ĉiutempe volonte rezignas je
kunlaboro.

La maljuna geedza paro loĝis en mizera luita ĉambro sur la kvara etaĝo de
unu el angulaj stratoj. Kamentuboj, fajromuroj kaj frontonoj formis preskaŭ la
solan perspektivon de la ambaŭ fenestroj de l' ĉambro. Suno kaj blua ĉielo en
rigardadis tiel malofte, kiel ili ĉi tion faris de longe en la vivo de l' amba
gemaljunuloj.

Malgraŭ tio estis la malriĉa violonisto precipe fiera, ke li povis pagi la
luoprezon por tiu ĉi propra loĝejo de sia malgranda gajno kaj ke li ne estis de
vigata loĝi en malriĉulejo. Tion ĉi li timis ĉiutage.

Kiam li estis ludonta ĉe diservo aŭ ĉe funebra meso, oni povis aŭdi lin ek
zercanta hejme dum longaj horoj kelkajn pasajojn, kiujn li antaŭe en kelkaj mi
nutoj estus ellerninta. Portante la violonon en la verda drapo sub la brako, li kase
eniris tremante sur la ĥoron de l' paroĥa preĝejo, kun tia sento, kvazaŭ li estus
akuzito, kiu antaŭ sia severa juĝisto devis aperi.

Nur ne en la malriĉulejon! Prefere vendi sian lastan havaĵon, kiun li ankoraŭ
nomis sia propra! Ĝi estis tri multvaloraj violonoj, kiuj li en sia juneco okaze
malkare akiris.

Ili ĉiel prezentis modestan sumon, kiu povus lin eble savi de la malriĉulejo.
Eble . . . se li kaj lia Doroteo ne ankoraŭ longe vivus. Por unu, du jaroj ĝi
povus cetere sufiĉi.

La disiĝo de tiu ĉi trezoro signifis por la maljuna violonisto envere la lastan
baton, per kiu la sorto povus lin frapi. Estis ja por li feliĉego, per tremanta mano
karesi la brunan lignon de siaj violonoj . . . la arĉon glitigi super iliaj kordoj
kaj revi, kiel tiuj tri instrumentoj estis akompanantaj lin en lia triumfa marŝo
tra la mondo.

La penso, ke li iam devos ilin por mono fordoni, estis por li tiel maldolea,
kvazaŭ li proprajn infanojn vendus en la sklavecon.

Lia Doroteo havis neniam iajn altflugajn aspirojn. Nur pri io ŝi ĉiam revis
kaj sopiris, kiel malgranda knabino pri pupo. Ĝi estis diamantaj orelingoj.

Jam kiel fianĉa donaco troviĝis tiuj ĉi juveloj en la programo. Tiu kompre
neble ne plenumiĝis; ĉar la juna paro havis apenaŭ tiom da mono, por havigi al
si partopage la plej necesajn meblaĵojn.

Sed malgraŭ tio la diamantoj ne estis forigitaj el la programo, akompanante ilin dum la vivo, kiel du en malproksimo brilantaj steloj, kvankam neatingeblaj, al kiuj tamen malgraŭ ĉio celis la plej kuraĝa flugo de l' fantazio.

Kiel grandioze aspektus la bela vizaĝo de l' juna muzikistedzino kun tiuj brilantaj juveloj!

Jaro post jaro pasis kaj jaron post jaro ili ambaŭ havis la esperon, ke la feliĉo tamen fine alvenos kaj kun ĝi la diamantoj de Doroteo.

Dume ŝi helpis al si per la malkaraj oritaj orelingetoj el la tempo de ŝia juneco, kies oro konstante malaperadis kaj paliĝadis. Kiam la unuaj argentaj haroj komencis aperadi sur ŝia kapo, ankaŭ ŝia sola ornamo brilis per nedubebla argenta koloro.

Kiel ofte ili jam posedis la diamantojn en la pensoj. Kiam ili trapasis apud ŝvelbutiko, ili faradis sian elekton, kiel infanoj apud vendejo de ludiloj. Jes, ili povis konduki seriozan kaj tre ekscititan disputon, ĉu tiu ĉi aŭ alia ŝtono me-
(Daŭrigota).

AKONTO PRI LA VIOLETO.

Originale verkita de Ivo Krajer.

Elkreskis malgranda violeto.

Ĝiaj unuaj folietoj ekrigardas jam el la burĝono.

Kiel bela! Kiel kara!

Klinitan sian kapon ĝi fiere levadas kvazaŭ ĝi ĉirkaŭrigardus.

Kiel ĉarma! Sed ĉie ĉirkaŭe nur dornoj kaj pikiloj.

En ŝia unua juna florado ĝi estis gaja kaj vigla, ĝi floradis por esti feliĉa . . . sed ve! la feliĉo ne venis.

Ĝi ekkonis la mondon, ĝian maldelikatecon kaj fierecon, eksentis ĝiajn ĉa-
